



Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 12 Decembro, 2014

Kara Leganto, la lasta numero de nia bulteno en la jaro 2014 estas riĉ-enhava, vi trovos "in memoriam" al antaŭ nelonge forpasinta Gregoro Dolgin (kun lia lasta traduko) kaj al Ivo Lapenna (fragmentoj el la blogo de La Brita Biblioteko); legendon el Odeso pri la busto al Zamenhof; kaj Pola Liston de Nemateria Kultura Heredaĵo.

Ne forgesu pri la loko, dato kaj tempo de la ĉi jara Zamenhofa Festo. Bv informi pri via ĉeesto. Dankon!

–La Redakcio

Zamenhofa Tago 2014

Loko: Klubejo sur la 24-a etaĝo
MDA Chicago City Apartments
63 E. Lake St., Chicago, IL 60601

Dato: 14an de Decembro
Tempo: 12 - 16

La Esperanto-Societo de Ŝikago
The Esperanto Society of Chicago
<http://www.esperanto-chicago.org>



Gregoro S. Dolgin: In Memoriam



La 21an de Novembro forpasis karmemora Gregoro Dolgin – Esperanta poeto, komponisto, tradukisto. Li naskiĝis la 20an de decembro 1934, en havenurbo Odeso (nun – Ukrainio) en familio de arkitekto Semeno Dolgin. Post la II Mondmilito la familio revenis en Odeson, en 50-aj Gregoro dum tri jaroj servis en armeo en Kartvelio, post la servado li laboris en odesa uzino “Polimer”, de kie pro la laboro kun kemiaĵoj li emeritiĝis en la 55-a aĝo. En 70-aj li kantis sur scenejo de la Odesa opera teatro.

Dum la lastaj 30 jaroj de sia vivo Gregoro multe okupiĝis sur la verda tereno de Esperanto: li verkis, tradukis, komponis muzikon. Last-junie li konfesis, ke revas eldoni kolekton de 17 mond-famaj kantoj, esperantigitaj de li, multaj tradukoj aperis pasintjare en multaj n-roj de Saluton! Ni planis kune aperigi en antaŭ-Kristnaska decembra (ĉi) n-ro E-tradukon de Schuberta “Ave, Maria”, ankaŭ konata kiel tria kanto de Ellen aŭ “Himno al la Virgulino” (D 839, Op. 52 Nr. 6) – lido de Franz Schubert el la jaro 1825. La peco de Schubert, ofte nomata lia *Ave Maria*, baziĝas sur la poemo *Lady of the Lake* de Walter Scott. La germanan tradukaĵon faris Adam Storck. La versio de Storck informas pri la junulino Ellen Douglas, la “princino de la lago”. La komencvortoj kaj la rekantaĵo “Ave Maria” kaŭzas oftan uzadon de la lido ankaŭ dum privataj diservoj (ekzemple je geedziĝaj kaj funebraj diservoj). Je tio foje oni kantas la latinan tekston de *Ave Maria* anstataŭ la romantisman originaltekston pri la Ŝuberta melodio. Jen estas ne finpreparita traduko de nia societano Gregoro.



Ave Maria!

Ĝoju, Maria, gracoplena.
Saluton al Vi, saluton! –
Gracoplena,
Ni preĝas kun Vi pri Jesuo.
Suferoj de via sankta filo
Reeĥas en koroj niaj.
Maria, gracoplena,
Ni preĝas kun Vi al Sinjoro nia,
Estanta ĉiam kun Vi –
Plej nobla el ĉiuj virinoj.

Ho, Sankta Maria,
Pekuloj surgenuiĝaj, ni pentas,
Atenton vian petante.
Benata pro fruktodono virina,
Pro fruktodono, per kiu
Aperis Jesuo,
Bonvolu aŭskulti la preĝon.

Sankta, Maria, Patrino Dia
Ora por ni – vivantaj.
Ora, ora por ni...
Amen'!

–*Esperantigis Gregoro Dolgin*

La traduko fariĝis “cigna kanto” de sindona kaj fervora Esperantisto Gregoro S. Dolgin. Ripozu Vi en paco, estimata Samideano.

–*Viktor Pajuk*



Zamenhof Rajdanta Sur la Puto

Odeso estas urbo de cent putoj (ne kremlaj putin-oj). Cent el pli ol milo da antikvaj putoj kaj cisternoj ĝis nun troviĝas en odesaj kortoj. Pri pli multoj da ili ekzistas interesaj legendoj. Tiel, sur la loko de la monument al Ludoviko Lazaro Zamenhof, konata kiel kreinto de Esperanto, en la korteto laŭ la adreso Deribasivska, 3 iam estis malnova puto. En 50-aj jaroj de la pasinta jarcento al skulptisto Nikolao Blaĵkov de Pollando oni mendis buston de L. Zamenhofo. Sed, pro nekonataj kialoj, la mendistoj ne venis. Dum iu tempo la busto kuŝis en la korto, kie loĝis la skulptisto. La najbaroj ofte stumblis je ĝi.

Iam ili venis al Blaĵkov kaj diris jene: "Aŭskultu, en nia korto estas profunda puto kaj ni timas, ke iu el infanoj ne falu tien. Ĉu ni rajtas per via Karlo Markso premege la putan kovrilon?". La skulptisto ekkonsentis, kaj la la gipsa busto estis starigita sur la puta kovrilo. Je la demandoj de la lokaj aŭtoritatuloj "al kiu estis muntita la monumento?", la skulptisto respondis, ke al la patro. Ne forgesu, ked dum la stalina tempo Esperanto-movado estis eksterleĝa. Kaj nun ĝi estas la plej unua en la mondo monumento al fama Esperantisto. En la jaro 2008 la puto estis detruita, kaj anstataŭ ĝi estis oficiale starigita monumenteto kun Zamenhofa busto.
—Boris Kolker



Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;
Familia membro: \$30,
Regula: \$20
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Cobbler Square Loft Apts.
1350 N. Wells St., Chicago, IL
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t.**

SEKVANTAJ KUNSIDOJ

14an de Decembro – Zamenhof Tago
12–4 p.t. \$20. **La Adreso:** MDA Konstruaĵo, 63 E. Lake Ave, 24-a Etaĝo, Chicago

27an de Januaro, 2015 – Humberto Perez: "Via sano – per Energia Terapio". **La Adreso:** Cobbler Square Loft Apts., 1350 N. Wells St., Chicago

Heroo de Montevideo: Ivo Lapenna In Memoriam Puto



La 10an de Decembro 2014 E-istoj ĉie en la mondo festos 6-an datrevenon de la Montevidea Rezolucio. Ĉi dokumento pri subteno de Esperanto estis akceptita de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Montevideo, Urugvajo, la 10an de Decembro 1954 kaj komisiis la Ĝeneralan Direktoron "sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo, kaj tiucele kunlabori kun Universala Esperanto-Asocio en aferoj koncernantaj ambaŭ organizaĵojn". La Montevidea Rezolucio ne estus ebla sen grandegaj penoj de granda entuziasto de la Internacia Lingvo – Ivo Lapenna (vd. *Saluton!* 2009, 5).

Post emeretiĝo Ivo Lapenna translokiĝis al Danujo. Eĉ la dato de lia morto (atenton!) – la 15an de Decembro 1987 – la jaro de 100-jariĝo de *La Unua Libro* – estas ligita al la amo de lia vivo, Esperanto: Zamenhof naskiĝis la 15an de Decembro.

—Olga Kerzjuk, Kuratoro de
E-kolekto de La Brita Biblioteko

Esperanto – en Pola Liston de Nemateria Kultura Heredaĵo

Estimataj amikoj, adeptoj kaj simpatiantoj de Esperanto, karaj esperantistoj en la tuta mondo! Jen ĝojiga anonco pri la Epoka Novaĵo, ĉar dank' al pola samideano Kazimierz Krzyżak kaj lia intensa kunlaboro kun Polaj parlamentanoj de la Parlamenta grupo subtenanta Esperanton, Pola Instituto de Nacia Kultura Heredaĵo kun helpo de landaj kaj eksterlandaj Eminentaj Subtenantoj, ni ĝisvivis la honoron ricevi aproban

subskribon de la Pola Ministro pri Kulturo kaj Nacia Heredaĵo, permeson lokigi ESPERANTON sur Polan Liston de Nemateria Kultura Heredaĵo. La sukcesa evento, iniciatita de Kazimiro Krzyżak kaj eminenta pola senatano prof. d-ro habil. Edmund Wittbrodt permesas estonte proponi ESPERANTON sur **Unesko-Liston de Nemateria Kultura Heredaĵo de la Homaro.** —Inf. E. Jaśkiewicz, Szczecin (Ŝĉecin)